

Letero de la sekretario

Karaj klubanoj,

la Londona Esperanto-Klubo havas historion tre longan. Ĝi estis fondita en 1903 kaj estis salutita de Zamenhof mem. Ĝi faris rimarkindan agadon kaj entute ĝi sukcesis pretervivi unu el la plej malfacilaj jarcentoj en la homa historio. Ne forgesu, ke niaj antaŭuloj aranĝis siajn kunvenojn eĉ dum la dua mondmilito, kiam la urbo estis bomb-atakata.



Ĉi-jare la sorto metis nian klubon en situacion novan kaj danĝeran. Ne temas pri milito sed pri io, kio kaŭzas similajn efikojn. Sed, se niaj antaŭuloj kapablis travivi la mondajn militojn, ĉu nin timigu ĉi tiu viruso? Kiam iĝis klare, ke personaj kunvenoj ne povos plu okazi, ni komencis kunveni rete kaj de tiam kunvenis ĉiuvendrede. Niajn retajn kunvenojn ĉeestas pluraj membroj kaj ankaŭ multaj geamikoj el aliaj landoj. Nia nordlondona sekcio, kiu ĉefe okupiĝis pri instruado, transformis sin al sukcesa Londona Esperanto-Kursaro, kiu instruas rete. Estis kaj estas en niaj kursoj proksimume 125 lernantoj. Organizanto de ĉi tiuj kursoj estas nia nova konsilanto, Anthony Bodineau.

Do, dankon al ĉiuj pro la kunlaboro. Antaŭ la fino de la jaro vi ricevos peton re-aligi al LEK. Ni donos pli da fleksebleco, pri kio la detaloj troviĝos sur la aliĝilo. Same, atentu pri la programo por decembro en kiu vi trovos la retan festadon de la zamenhofa vespero la 18-an kaj jarfinan feston, ankaŭ per Zoom dum la lasta horo de la jarfina tago.

La Sekretario



Pri komitato kaj konsilantaro ... 2

En tiel-nomata *Letero de Konsilanto*, aperinta en la oktobra anstataŭa bulteno, mi konfesis nescion pri la motivoj de tiuj, kiuj en jaro 1926 laŭŝajne decidis ampleksigi la gvidantaron de LEK (ĝis tiam "la Komitato") kaj nomi la novan instancon "Konsilantaro". Baldaŭ poste mi (kaj probable ankaŭ vi, se ĉi tio atingis vin per Interreto) ricevis de klubano Ian Fantom retmesaĝon, kiu almenaŭ parte klarigas la aferon. Interalie li informas, ke antaŭ preskaŭ jarcento oni emis laŭeble eviti kreon de neologismoj, uzante anstataŭe vortojn kunmetitajn. Tion konfirmas mia Edinburg Pocket Dictionary (1933) kie por anglalingva "council" oni proponas nur "konsilantaro". En la nuna epoko oni tamen parolas pri "Konsilio de Europano" kaj pri "Magistrato de Milton Keynes", ĉar ekzistas pluraj distingendaj specoj de "council". (Por brita "Privy Council" tamen ja taŭgas termino "Konsilantaro", ĉar tio principe nur konsilas – ĝi nek regas nek administras - la suverenon.)

Eble mi devintus eksplice demandi tion, kion implicis mia "kia tiel?": ĉu parolantoj de Esperanto akceptu limigon de signifo de iuj kunmetitaj vortoj al specifa ekzemplo, aŭ ĉu ĉia ajn aro da (ekzemple) konsilantoj, vortoj, vagonoj oni rajtu nomi (respektive) konsilantaro, vortaro, vagonaro; kaj ĉu administra strukturo kaj regularo de LEK, kiel oni ilin difinis fine de la dudeka jarcento, ankoraŭ taŭgas en la dudekunua?

Dankon al Ian, pro lia kontribuo al tiuj debatoj! Aliaj klubanoj lin imitu, sciigante al ni siajn opiniojn tiel, ke Konsilantoj povu esti ankaŭ konsilatoj.

TGP

Kiun lingvon la birdoj parolas inter si?



La uzbekan !

3 ... kaj pri kukumo kaj kurkumo

Konsonanto "r" povas esti problema por lernanto de Esperanto kies unua lingvo estas la angla. En tiu lasta, silab-komenca "r" estas ja prononcata, sed ne kiel en Esperanto kaj pluraj aliaj lingvoj, kun lango-vibrado. Plej ofte kiam (en la angla) "r" staras inter vokalo kaj sekvanta konsonanto ĝi rolas nur por longigi koncernen vokalon. Tial tiun literon iuj devas multe ekzerci kaj, primajstrante ĝin, peni ne forgesi ĉiam klare prononci.

Malpli certe, sed konforme al observado mia, la samaj homoj fojfoje ne nur misprononcas sed ankaŭ misaŭdas tiun literon, konfuzante ekzemple "karto" kun "kato" aŭ "kordo" kun "kodo".

Kvankam neniel kulpis la modela prononco de Lode Van de Velde, kiu en oktobro prelegis interrete pri *Kuracado per Plantoj*, mi mem spertis momentan surprizon kiam mi aŭdis rekomendon pri kukumo – des pli pri kukumo laŭdire seka, oranĝ-kolora kaj pulvora.

Kompreneble – almenaŭ por tiuj, kiuj uzas Esperanton dum kuirado – vere temis ne pri kukumo (anglalingve "cucumber") sed pri kurkumo (anglalingve "turmeric"). Nek pri kukurbo temis. Vi probable legas ĉi tion tro malfrue, krom se vi estas usonan(in)o, por ke "kukurbo" estu vorto ĉijare utila. Tamen memoru ĝin, por eventuala uzo fine de oktobro venontjara.

Post pli ol duonjarcenta kunvivado kun esperantista edzino, tia miskompreno pri kuir-termino malofte okazas.

Tamen ankoraŭ mankas en mia Esperanta vortprovizo multaj terminoj, kies nacilingvan ekvivalenton mi ja rekonas kaj komprenus. Aliaj esperantistoj havas malsaman mankon, sed samon problemon – ne povi plene ĝui interesan prezenton pri temo faka. Kion do fari? Eventuale oni povus sin prepari per uzo de leksikono dulingva, lernante kelkajn Esperantajn vortojn, kiuj probable uziĝos dum estonta prelego pri temo medicina, muzika, sporta, psikologia ... ĉia ajn, pri kia oni ne estas mem fakulo. Klopodu do ĉi-novembre pri fonetiko, islamo kaj astronomio!

TGP

Kie ni estas ?

5238979 estas virusa malsano
6761439 estas speco de energio
5974639 estas franca verkisto



1	2	3	4	5	6	7	8	9
---	---	---	---	---	---	---	---	---

Kluba Programo:

4

novembro

- 06 *La Fraz-melodio en Esperanto*
Prof. John Wells
- 13 *Surprizaj elementoj en la urbo*
Ella Strug
- 20 *La originoj de islamo*
Trevor Steele
- 27 *Lunoj de Jupitero*
Bernard Larue

decembro

- 04 *[Anoncota]*
- 11 *[Anoncota]*
- 18 *Zamenhofa Vespero*
Maurizio Giacometto
- 31 *Novjaron festas tuta mondo [Komenc-horo anoncota]*

Loko, horaro kaj aliaj informoj

Ni kunvenas vendredvespere. Dum la Kronviroza krizo, kunvenoj okazas per la reta sistemo Zoom, komenciĝante je 19h (UTC)
Kunvenoj ĉe Old Diorama Arts Centre neniel povas plu okazi ĉi-jare, sed eble rekomenciĝos en januaro 2021. Novaj spektuntoj bonvolu legi KIEL PARTOPRENI . . . en la oktobra Bulteno, paĝo 3.

Funkciuloj (Ankoraŭ rolantaj pro neokazo de jarkunsido de LEK en marto 2020)

Honora Prezidanto: Prof. John Wells;

Honoraj Vicprezidantoj: Heleno Fantom, Joyce Bunting.

Konsilantaro: Chris Lewis (Prezidanto), Matt Peperell (Vicprezidanto), John Wells (Vicprezidanto), Renato Corsetti (Sekretario kaj Programo), Arturo Prent (Kasisto), Anica Page (Registristo), Antony Rawlinson (Bultenisto), Anthony Bodineau, Roland England, Terry Page.